

**SAT**  
**eH**Sennacieca Asocio Tutmonda  
en Hispanio

# DOKUMENTO

**Numero 5/eo**

## LA ALIAJ OLIMPIKOJ

Dum la lastaj monatoj oni multe aŭdis paroli pri la Olimpikaj Ludoj, kaj kelkaj eble pensis ke la iniciatoj de diversaj urboj ilin organizi estis popolaj en la aŭtenta senco de la vorto. Sed por koni kio estas vere popola, eble ni povas rigardi malantaŭen kaj scii pri aliaj internaciaj ludoj, kie ĉefis la sporta spirito, kaj ne la konkuro inter nacioj kaj ŝtatoj.

Ni prezentas du rilatajn tekstojn pri la Popolaj Olimpikoj: artikolon de Jakvo Schram, Prezidanto de la Plenumkomitato de Sennacieca Asocio Tutmonda, SAT, kaj aliflanke memoraĵojn de persona atestanto de la ĉefa sperto de provo de popola sporto, la Popola Olimpiko de Barcelono, en 1936.

## LABORISTAJ OLIMPIKAJ LUDOJ

Jakvo Schram

*Publikigita en "Sennaciulo", oktobro 2004.*

Pretas kiel divido inter la diversaj sportlokoj el la Antverpena distrikto Hobokeno tute nova placo. Ĝi ricevos la nomon "Jacques Schram parko". Per ĝi la Hobokena distrikto volas honorigi mian onklon, kiu dum la tuta aktiva vivo batalis por propagandi laboristan sporton. Dum multaj jaroj li estis delegito de la Popola-Olimpiko aŭ, kiel li ĉiam nomis ĝin, la Laboristaj Ludoj.

Mi faris iom da esploro ĉe AMSAB kaj trovis tre valorajn tekstojn el kiuj mi ĉerpis la sekvan tekston. Mi verkis la tekston kun en la koro granda ĉagreno. Dekojn da fojoj mi, kiel juna helpanto, iris kun la onklo al popoldomoj kaj sportkonstruaĵoj por montri la lumbildojn, kiujn li faris dum diversaj Popol-Olimpikoj kiujn li partoprenis. Plej karmemora estas por mi la lumbildoj de la Popol-Olimpiko en Israelio kaj mi ne povas pensi al la bildoj sen ke mia koro pleniĝas kun granda ĉagreno por la granda idealo. Pri engaĝita grupo de entuziasmoj kies batalo plene perdiĝis.

La unua Popol-Olimpiko devis okazi en Barcelono en 1936, sed jam tiam laboristoj batalis kontraŭ laboristoj serve al la ideoj de la demagogoj.

## Olimpikaj ludoj burĝa - laborista

Fine de la 19-a jarcento fondiĝis Laborista sport-movado, kiu laŭ strukturo kaj aspekto multe similis al la neŭtrala aŭ burĝa varianto. Tamen relative rapide post la fondiĝo, ĉe la movado komenciĝis ideologia profiliĝo. La movado iris en la manoj de maldekstraj pensantoj kaj pli kaj pli oni propagandis: ke sporto ne estis sistemo per kiu oni gajnas monon aŭ gloron, sed per kiu oni plibonigas la sanon aŭ la ĝeneralan vivkondiĉon. Ĉe la burĝaj sportistoj la ekonomia ligiteco ludis signifan rolon kaj ĉe la laboristaj sportistoj plej grave estis sekvaj kvin reguloj:

- unue - oni ne strebis tro fortan konkurson, serian spiriton
- due - iu formo de kultiviĝo de sportistoj malutilas kaj malrekomendiĝis
- tria - fortega malakcepto de komerciĝo de sporto, kaj instigado al amatorismo de la sportistoj
- kvara - sporto devas servi la amason, kiu signifas ke ĉiu homo devas havi la eblon sporti
- kvina kaj lasta - pere de sporto kaj la evidentaj internaciaj kontaktoj atingi mondan pacon.

La laboristaj, socialistaj eniris konkurencon kun la burĝaj sportkluboj kaj ili argumentis ke la amatora sporto estas la vera sporto laŭ la mita pasinteco de "vera sporto", la "sportspirito" kaj evidente la harmonia kaj spirita klerigado.

La plej granda propagandilo de la burĝaj sportistoj estis evidente la Olimpikoj, kie laŭ la olimpika idealo la homoj kuniĝis en paco kaj harmonio. Sed rebatis la ruĝaj (laboristaj, socialistaj) sportistoj kaj defendantoj de la vera sporto: la Olimpikoj estis nur propagandilo por naciismaj sentoj, komerca spektaklo kie mono pli gravas ol harmoniaj korpo-movoj. La Olimpikoj estis nur kaj nenio pli ol reflektiĝo de la socia kapitalisma modelo. La diron de la barono De Coubertin (fondinto de la modernaj olimpikaj ludoj 1894) ke "laborista sporto plej proksimas al la sport-ideal", la ruĝaj sportistoj kiel eble plej ofte propagandis kaj uzis.

En 1931 decidis la Olimpika Komitato (IOC) ke la XI-aj ludoj okazos en Berlino. Tiu-tempe la germana registaro estis centra dekstro laŭ politiko, kaj ke iom poste la faŝisma Hitlero transprenus la potencon, la Olimpika Komitato ne antaŭvidis.

Fakte la nazioj ne tiel kontentis kun la Olimpikoj ĉar ili pli ŝatis la reakcian kaj forte naciisme strukturitan Germanan gimnastikan movadon kie aŭdiĝis marŝmuziko, kaj flirtigado de flagoj kaj simboloj estis same grava ol la sporto mem. Krome la prezidanto de la Germana Olimpika Komitato Theodor Lewald kaj la sekretario Carl Diem havis judajn familianojn. La nazio jam tuj postulis ilian maldungon el la komitato.

La 16-an de marto 1933 Hitler akceptis T. Lewald kaj male al tio kion li antaŭvidis Hitler prezentis plenan subtenon al la Olimpikoj. Tamen la problemoj ne tute malaperis. Olimpika regularo malpermesis iun formon de rasisma aŭ religia diskriminacio kaj je tiu nivelo la Germanio de Hitlero ne ĝuis plej bonan reputacion.

Dum kunveno de IOC de junio 1933 en Vieno, oni esploris la situacion. Kernoj de la diskuto estis: ĉu judoj povis havi lokon en la germana olimpika teamo?


Laŭ du germanaj komitatanoj, Karl Ritter von Halt kaj Theodor Lewald ne estis ajna problemo tiukaze. Ili eĉ donis surpaperan garantion. Ankaŭ dum kunveno de IOC en Ateno, majo 1934, konfirmiĝis la antaŭaj decidoj.

Kiel ni nun ĉiuj scias la Germana garantio estis nenio pli ol politika manovro. Judoj estis 'purigitaj' el la publika vivo kaj evidente ankaŭ sporto-kluboj. Pro manko de trejn-ebloj oni forprenis de ili ĉiun eblon partopreni al la Olimpiaj ludoj. Ankaŭ aliaj trukoj estis uzataj. La juda atleto Gretel Bergmann kiu rimarkinde pli bone faris ol la arja rivalo Elfriede Kaun ne atingis la oficialan selekton pro manko de registrado en sporto-klubo. Fakte neniu juda virino aŭ viro akiris lokon en la germana teamo.

Kvankam IOC estis kontenta kun siaj decidoj, la plejmulto tamen asertis ke la faŝisma Germanio kun sia kontraŭ-juda, -katolika kaj -socialisma propagando ne povas esti la loko kie la Olimpiaj Ludoj povas okazi. Mondvaste okazis protestoj. Judaj organizoj ludis en ĝi gravan rolon, precipe en Usono. En la malnova Eŭropo la plej akraj protestoj venis el la maldekstraj laboristaj sportfederacioj. La socialistaj kaj komunistaj internaciaj sportfederacioj eĉ forgesis pri la dumjaraj vetooj. Dum ĝenerala kunsido en Prago la 6-an de septembro 1935 ili kondamnis kaj la nazismon kaj la proksimiĝantajn Berlinajn Olimpikajn ludojn.

Malgraŭ la elekto en majo 1936 de popolfronta registaro en Francio sub gvidado de la judo Léon Blum, la ŝtatestretario pri sporto Léo Lagrange promesis sekvi faritajn engaĝiĝojn. Kiel suĉilo la laboristaj sportistoj ricevis la promeson ke Francio donus signifan subtenon al la alternativaj laboristaj ludoj en Barcelono.

En Belgio la afero sorbis multe da inko. En novembro 1935 aliĝis la pinto de la laboristaj sportfederacioj al la Internacia Komitato defende al la Olimpika Idealo. Per ĝi ili sekvis la direkton de la Socialista Laborista Sport-Internacio (SASI). Unu el la plej gravaj agantoj en SASI estis Louis Lalemand.



La belga delegacio sur Ramblas en Barcelono kun la flago de Antverpena Juda Laborista Sporto-klubo.

Strange estis ke en Britio apenaŭ ekzistas kontraŭeco al la Berlinaj Ludoj.

### **Barcelono 1936 kiel kontraŭ-Olimpiko**

Dum la 30aj jaroj la sport-vivo kaj precipe la laboristoj sportistoj influigis de la Popolfronto. La *Esport Popular* (katalune, populara sporto) kombinis sporton kun la politiko. Postulo estis al ĉiu alirebla, nekomerca formo de sport-ebloj kie la valoroj egaleco, frateco, solidareco kaj honesta ludo ne estus vanaj konceptoj. Samtempe sporto estis ilo en la politika batalo por pli da demokratio kaj kontraŭ la faŝisma idearo.

La diversaj sport-asocioj el la Kataluna regiono unuiĝis en la jaro 1936 en la "*Comitè Català pro Esport Popular*" (Kataluna Komitato por la Populara Sporto). Ĝi estis popolorganizo sen formalaj ligoj kun politiko aŭ sindikataj organizoj.

Ek de la fondiĝo ĝi komencis kun granda entuziasmo al organizado de diversaj sport-manifestacioj. Plej ambicia plano estis la Popol-Olimpiko, kiu ne nur devis esti propagandilo por amatora nekomerca sporto, sed precipe denunco al la Olimpikaj Ludoj en la faŝismema Germanio. La komenca ideo estis organizo je nacia skalo sed la entuziasmo el landoj kiel Francio kaj Belgio kaŭzis ke fin-fine la alternativa olimpiko havu internacian karakteron.

Kvankam eĉ nun homoj diras ke la Hispana popol-olimpiko estis iniciato de organizita maldekstra laborista sportmovado la historio devas havi sian rajton. Plejmulto de la partoprenantoj apartenis la maldekstraj sport-asocioj, sed la projekto estis multe pli larĝa. La internacia Komitato defende al Olimpika Idealo volis kunigi kontraŭantojn al la Berlina ludoj. En hodiaŭataga terminologio ni parolus pri kunigo de maldekstraj-progresemaĵoj potencoj. La organiza Kataluna sportfederacio estis aŭtonoma, ne ligita al iu politika partio. Fakte la Popol-Olimpiko estis iniciato de variaj grupoj mult-tendencaj kiuj retrovis sin en la olimpika Idealo, la fratiĝo de popoloj. Nur la Popol-Olimpiko reprezentus la neprofiteman karakteron de la veraj Olimpikaj Ludoj: "la olimpika spirito ne estu en Berlino sed en Barcelono" diris la maldekstra gazetaro.

La organizado alportis multegajn problemojn. Manko de tempo sed granda entuziasmo zorgis ke giganta projekto efektiviĝis. Financa subteno venis de la hispana, franca kaj kataluna registaroj. Ankaŭ la Barcelona urbestro aldonis sian financan subtenon. Feliĉe oni havis la infrastrukturon de la en 1929 okazinta Mondo-ekspozicio. Dudek tri delegacioj enskribiĝis. Landoj aŭ regionoj sen politika sendependeco kiel Alĝerio, Palestino, Eŭskio ricevis en la Popol-Olimpiko egalrajtan statuton. Per ĝi oni volis substreki la liberecon de ĉiuj popoloj.

Kreiĝis tri kategorioj de sportistoj: la pintaj atletoj, la spertaj atletoj kaj la amatoroj. Oni volis atingi kiel eble plej multajn homojn sendepende de iliaj fizikaj kondiĉoj. Ankaŭ partopreno de virinoj stimuliĝis.



Anoj de la Internacia Brigado

La Popol-Olimpiko komenciĝis la 19-an de julio kun diversaj manifestacioj kaj festoj kaj daŭrus unu semajnon. La 18-an de julio – la tago antaŭ la oficiala malfermo – oni faris ĝeneralan ripeton. Multaj membroj de la organiza komitato estis lacaj kaj decidis tranokti en la stadiono. Bedaŭrinde la 19-a de julio 1936 eniris la historion pro tute alia kaŭzo ol la festo de la Popol-Olimpiko.

El taglibro de belga atleto kiu partoprenis la Popol-Olimpikojn ni legis: "La stratoj estas malplenaj sub varmega suno (...) sur Plaza del Comercio ni kolizias sur la unuaj barikadoj (...) centoj da metroj for ni vidas armitajn sindikatistojn (...) la barikadoj aperas ĉiujn 100 metrojn. Ĉiu flankstrato estas barita (...) ni ŝteliras preter la fasadoj de la domoj. Kugloj siblas trans la placo. Instinkte ni kurbas la dorson kaj fuĝas en portalon (...) Ni klare vidas kiel de la turo de la preĝejo snajperoj pafas laboristojn en la dorso, kiuj troviĝas malantaŭ la barikadoj."

La Berlinaj Olimpikoj iĝis grandega sukceso. Hitlero volis imponi la mondon kaj sukcesis; Berlino superis ĉion.

Nur dum la lastaj jardekoj esploristoj faras demandojn pri la tuta projekto. En 1936 oni konsideris la Berlinan Olimpikan Ludon kiel modelo por la estonto. Ankaŭ pro tio la Popol-Olimpiko eniris la damnan angulon. Sufokita de la Hispana interna milito ĝi iĝis sensignifa piednoto en preskaŭ forgesita historio.

La Popol-Olimpiko el Barcelono tamen ilustras la potencon kiu povas veni el engaĝiĝo kaj entuziasmo. La valoro de ĉi tiu ekzemplo eskapas al ĉiu limigo de tempo kaj spaco.

## OLIMPIAJ LUDOJ EN BARCELONO

Eduardo Vivancos

*Artikolo verkita katalunlingve en la jaro 1992 kaj aperinta samjare en la revuo "Flama", organo de la Kataluna Asocio de Toronto.*

**"Plej grave en la Olimpiaj ludoj ne estas gajni, sed partopreni." Pierre de Coubertin.**

Dank' al la XXV Olimpiaj Ludoj Barcelono iĝis la celpunkto de la rigardoj de milionoj da personoj ĉie en la mondo. Ŝajnas ke Barcelono estis reeltrovita. Ĉiuj parolas pri ĝi. La gazetaro kaj televido montris bildojn kiuj ŝajnas veni el lando de mirindaĵoj. Bildoj de la tuta urbo, de ĝiaj karakterizaj monumentoj, de la Gotika Kvartalo, de la olimpika vilaĝo, de la ĵus konstruita Palaco Sant Jordi, de la multnombraj sportaj instalaĵoj kaj de la olimpika stadiono de Montjuic. Ho, stadiono de Montjuic! Por multaj personoj de mia generacio ĝi estas plena je memoroj kaj de certa nostalgio.

Mi mense revidas tiun stadionon kia ĝi estis de antaŭ 56 jaroj (1936).

Grupoj da entuziasmaj kaj iluziplenaj gejunuloj iris tien ĉiutage por sin trejni kun la celo kvalifikiĝi por partopreni en la porjunulaj konkursoj de la Olimpiaj Ludoj de Barcelono. Jes, mi bone diras, la Olimpiaj Ludoj de Barcelono, kiu devis okazi en la jaro 1936, kvankam nuntempe oni ne multe mencias pri tiu signifoplena evento.



Sed antaŭ daŭrigi pri la historio de tiu olimpiado, bedaŭrinde frustrita pro tragikaj cirkonstancoj, ni turnu la paĝon de la libro de la tempo kaj mallonge ni trarigardu la historion de la modernaj Olimpiaj Ludoj. La iniciatanto de la Ludoj estis la franco Pierre de Coubertin, sincera humanisto kiu kredis ke partopreno de homoj el la tuta mondo en sportaj konkursoj alportus spiriton de amikeco, frateco kaj komprenemo inter la partoprenantoj el kiu ajn etna deveno, kredo aŭ socia pozicio ili estas.

Ni notu ke, bedaŭrinde, la idealismaj celoj de Pierre de Coubertin nur parte realiĝis kaj ke la Ludoj estis ofte falsigitaj pro aĉaj politikaj manipulacioj, rasismo, furioza naciismo, netoleremo, senbrida komerciismo kaj la ambicio gajni je ĉiu kosto, uzante rimedojn ne tre etikaj, kontraste kun la deziroj de Coubertin kiam li diris: "Plej grave en la Olimpiaj ludoj ne estas gajni, sed partopreni; plej grave en la vivo ne estas la triumfo, sed la klopodo por ĝin atingi."

La idealo kiun Pierre de Coubertin proponis al la partoprenantoj, ne identiĝas al la sola venko, sed al la kavalireca spirito de la sporto, ĝia sindonema praktiko, la afabla akcepto de la sorto, ĉu favora, ĉu malfavora, la amikeca kunlaborado inter nacioj, etnoj kaj individuoj ĝenerale, celoj kiuj enhavas altvalorajn moralajn elementojn kaj kiujn la publiko ankaŭ scias apreci.

La unua moderna Olimpiado okazis en Ateno en la jaro 1896, kaj ekde tiam, escepte dum la jaroj de la du mondmilitoj, ĝi okazas ĉiun kvaran jarojn en malsama urbo. Ja ekde la komenco de la olimpia movado la barcelonanoj montris grandan intereson por la Ludoj. Kiam en la jaro 1929 konstruiĝis la stadiono de Montjuic, la intenco estis posedi la bezonataj strukturoj por povi ilin organizi. Konsekvence Barcelono prezentis, siatempe, la kandidatecon por organizi la Ludojn de la XI-a Olimpiado de la jaro 1936.

La Internacia Olimpia Komitato kunvenis en Barcelono en la jaro 1931, sed ĝiaj membroj ne atingis interkonsenton. Unu jaron poste, en 1932, la komitatanoj renkontiĝis en Los Anĝeleso kaj per balotado ili elektis Berlinon. Tiu urbo rivevis 43 voĉdonojn, kontraŭ 16 por Barcelono kaj 8 sindetenojn. En tiu tempo Germanio havis politike centrisman reĝimon, kaj donis la impreson ke ĝi povis organizi la ludojn kun certa garantio de senpartieco. Sed en januaro de 1933 Adolfo Hitler kaptis la ŝtatan povon kaj tuj li enkondukis rasistajn leĝojn. La senpartieco jam ne eblis malgraŭ la promesoj faritaj de Hitler al Baillet-Latour, prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato.

La 5-an de septembro de la jaro 1935 Hitler proklamis la leĝojn de Nuremberg senigante la judojn de la germana civitaneco, kaj samtempe li intensigis kruelan persekuton kontraŭ siaj politikaj oponentoj. Tiaj cirkonstancoj kreis etoson de ĝenananta timo. Multaj sportuloj rifuzis iĝi instrumentoj de la nazia propaganda maŝino. En multaj landoj kreiĝis komisionoj kun la celo trovi alternativojn al la ludoj de Berlino.

La logika loko estis Barcelono kiu, kiel ni jam vidis supre, kandidatiĝis por la organizado de la Olimpiaj Ludoj kelkajn jarojn antaŭe. Konsekvence kreiĝis la Komitato de la Popola Olimpiado de Barcelono kies prezidanto estis Josep Antoni Trabal; la sekretario estis Jaume Miravittles, konsiliano de la aŭtonoma kataluna registaro (Generalitat de Catalunya). La dato: de la 19-a ĝis la 26 de julio. Baldaŭ alvenis aliĝoj el Francio, Usono, Svisio, Belgio, Kanado, Grekio, Svedio, Maroko kaj multaj aliaj landoj. Pro evidentaj motivoj ne venis aliĝoj el Germanio, sed kompanse aliĝis multaj germanoj kiuj loĝis eksterlande kaj por kiuj la partopreno en la ludoj de Berlino estis kompreneble barita.



Sabate postagmeze, la 18-an de julio, la stadiono de Montjuic bolis je aktiveco. Multaj alilandaj atletoj troviĝis tie por trejniĝi kaj por interkonatiĝi kun aliaj partoprenantoj de la Ludoj. Ankaŭ tie troviĝis multaj barcelonaj junuloj, membroj de la sporta fako de la Popola Enciklopedia Ateneo, de la Barcelona Laborlernejo kaj de aliaj lokaj kluboj. Tiuj junuloj devis praktiki gimnastikajn ekzercojn por esti prezentataj la morgaŭon.

La kontaktoj inter ambaŭ grupoj estis ege interesaj kaj instruplenaj malgraŭ la evidentaj lingvaj problemoj. Ne multaj alilandanoj scipovis paroli hispane. Kelkaj fuŝparolis vortojn ĵus lernitaj kaj terure prononcitaj okazigante amuzajn miskomprenojn. Mi mem klopodis uzi mian limigitan konon de la franca lingvo, sed kun ne multe da sukceso. Plej ofte afablaj mienoj kaj varmaj manprenoj anstataŭis vortojn. La etoso estis tre frateca. Por la unua fojo mi havis la okazon rekte rilati kun alilandanoj. Tiu sperto plifortigis miajn konvinkojn pri vera amikeco inter homoj el la plej diversaj devenoj.



Entuziasmo kaj eŭfomio ŝvebis super la stadiono, sed bedaŭrinde miksitaj kun sento de antaŭtimo kaj streĉo. Dum la tuta tago oni konstante aŭdis alarmajn novaĵojn pri armea ribelo. La registaro asertis ke ĉio estis sub kontrolo, sed ne multaj estis konvinkitaj pri tiu aserto. Kiam la junuloj pretiĝis por la gimnastikaj ekzercoj, unu el la organizantoj morne anoncis: "Faŝistaj manoj sabotis la elektran instalaĵon. Ni solvos la problemon, morgaŭ ĉio estos preta por la inaŭguro de la Ludoj".

Paralele kun la sportaj konkursoj organiziĝis Kultura Olimpiado kaj estis preparitaj multnombraj folkloraj prezentadoj. Inter la partoprenantoj de la kulturaj aktivaĵoj troviĝis la famkonata violonĉelisto Pau Casals.

La vespero de la 18-a de julio Pau Casals direktis la provludon de la Naŭa Simfonio de Beethoven kiun la orkestro, kunlabore kun la kantistoj de fama Barcelona Ĥorsocieto (Orfeoó Gracienc), devis ludi la morgaŭon en la Greka Teatro de Montjuic okaze de la inaŭguro de la Olimpiado. Dum la provludo prezentiĝis oficialulo kiu per ekscitita voĉo diris, "Ĉesigu la ludprovon. Ni estis informitaj ke ĉinokte okazos armea ribelo en la tuta lando. La koncerto kaj la Olimpiado estas nuligitaj. Tuj forlasu la ejon."

Je tiu anonco Casals forte konsterniĝis. Li sin turnis al la muzikistoj kaj kantistoj kaj diris: "Mi ne scias kiam ni renkontiĝos denove; mi proponas al vi ke antaŭ la disiĝo ni ĉiuj kune ludu la simfonion", kaj levigante la taktobastonon daŭrigis la provludon kulminante je la fina parto kiu tekstas jene:

*Jen brakumo al milmiloj,  
jen ĉi kis' al tuta mond'!  
Fratoj! super stela rond' ...*

"Kia emocia momento! Kaj kia kontrasto" memoris la majstro kelkajn jarojn poste. "Ni kantis la subliman himnon de la frateco, dum sur la stratoj de Barcelono, kaj de multaj aliaj urboj, prepariĝis lukto kiu tiom da sango devus verŝigi".

La ĥorgrupo ankaŭ estis provludinta la himnon de la Popola Olimpiado verkita de la poeto Josep María de Sagarra. Tiu himno devis esti kantata antaŭ miloj da personoj precize la 19-an de julio:

*"Sota el cel blau l'únic mot que ens escau és un crit d'alegria, Pau!"  
"Sub la blua ĉielo la sola trafa vorto estas ĝojkrio, Paco!"*

Sed anstataŭ aŭdi la himnon de la paco, en tiu tago la barcelonanoj aŭdis la sonon de senĉesa pafado, kaj je la kvina kaj kvarono matene, korŝiran alvokon per la Barcelona radiostacio: "Barcelonanoj, la timita momento jam alvenis; la armeo, perfidante sian honorparolon, ribeliĝis kontraŭ la Respubliko. Por la barcelona popolo alvenis la horo de la grandaj decidoj kaj grandaj oferoj: detruu la ribelitan armeon. Ĉiu civitano estu preta por plenumi sian devon. Vivu la Respubliko!"

Multaj el la atletoj kiuj venis por la Popola Olimpiado, aktive partoprenis en la lukto kontraŭ faŝismo; kelkaj el ili neniam plu tretus la arenon de stadiono. Tiel finiĝis, antaŭ ol ĝi komenciĝis, la esperplena Popola Olimpiado de Barcelono, preparita kun tiom da entuziasmo kaj amo fare de bonvolaj homoj kiuj sincere kredis en la humanisma olimpia idealo.



---

**SAT-en-Hispanio (SATeH)**  
Poŝtokesto 8537, ES-28080-Madrid  
esperanto@nodo50.org  
<http://www.nodo50.org/esperanto/>